

Ilona Koutny

Profesoro Szerdahelyi forpasis antaŭ 10 jaroj

(rememoro kaj ĝustigo)

Kun serena vizaĝo rakontas anekdotojn aŭ fervore prelegas - tiel li aperas en mia memoro. Li provis trovi la ĝustan vojon al ĉiuj, transdoni valorajn viverojn. Ni - liaj gestudentoj - ĉiuj ŝatis lin, eĉ tiuj, kiuj poste ne okupiĝis pri E-o.

Ekde la fondo de la E-fako en 1966, li prizorgis ĝin ĝis sia morto en aŭgusto de 1987. Li devis persiste batali kontraŭ ne-esperantistoj kaj esperantistoj (!) por defendi la prestiĝon de E-o. Li pensis, ke la tempo maturiĝis por science okupiĝi pri ĝi en universitata nivelo - kelkaj dubis, neglektis, malrespektis tion, ja por ili movado sufiĉis (kelkfoje eĉ nun mi renkontas similan sintenon!).

Li ne blinde defendis E-on kaj edukis homojn ne rekte por la bezonoj de la movado (la tempo lin konfirmis, ĉar pluraj el liaj eksgestudentoj poste aktive partoprenas en ĝi!). Li per sciencaj metodoj provis trovi la lokon de E-o inter la lingvoj naturaj kaj planitaj, lingvistike analizi ĝin, kaj formi instruistojn, lingvistojn bone informitajn pri E-o. Istva'n Szerdahelyi estis bona pedagogo, elstara lingvisto-esperantologo kaj preciza filologo. Vico da studoj kaj libroj montras lian vastan interesiĝon kaj grandan laborkapablon: li prezentis novan aliron al morfologio, semantiko, etimologio; li profunde esploris interlingvistikon, kies rezulto estis la universitata lernolibro pri interlingvistiko kaj la populara libro "Bábelről a világnyelvig" (la esperanta versio "De Babelo ĝis la mondlingvo" ŝimas ĉe iu Esperanta eldonejo (!), kvankam el pluraj vidpunktoj ĝi estas pli kompleksa ol la verko de Eco).

Li verkis la bazan studmaterialon por la E-fako (lernolibro, literatura krestomatio, metodologio) kaj trovis tempon ankaŭ por aplikata lingvistiko kaj por prezenti E-on en ne-esperantista medio. Li okupiĝis ankaŭ pri la propedeŭtika valoro de E-o por la lernado de hindo-eŭropaj lingvoj, sed tiu racia propono kaj tiam kaj nun trovas ŝtopitajn orelojn. Li alfrontis la defion de la "meza" Hungara-Esperanta vortaro, kiun li ĉefredaktoris ĝis sia morto (ĝi aperis komence de 1996, finita de I. Koutny) kaj kunlaborigis multajn hungarajn esperantistojn.

Do, li gvidis la fakon dum 21 jaroj, havante regule eksterajn lekciistojn (ekde 1985 ankaŭ mi estis inter ili). Post lia frua, neatendita morto antaŭ 10 jaroj ekestis la ebleco por du postenoj ekde la studjaro 1987/88, kiujn ricevis Varga-Haszonits Zsuzsa kaj mi. Lian skribotablon mi okupis dum 8 jaroj (ĝis la fino de 1995), provis daŭrigi lian laboron kaj konservi la etoson kreitan far li. (Ankaŭ nun mi klopodas sekvi la vojon montritan far li en alia lando, ĉe alia universitato.)

Mi sentas la devon ĝustigi la informojn laŭ la nuna prizorganto de E-fako aperintajn en la 120-a n-ro de Eventoj kaj ankaŭ en IPR 97/2, kies redaktoro li estis iam. Ni ne forgesu, ke li prezidis ILEI (1985-87) kaj donis novan direkton por la instruado de E-o. Nun estas tempo ĝuste kaj estime rememori la agadon de prof. Szerdahelyi.

d-ino Ilona Koutny, Instituto de Lingvistiko, Universitato Adam Mickiewicz, Pozna, Pollando)

[Tiu ĉi artikolo aperis ankaŭ en Eventoj N-ro 130 - NDIR]